
# *Díaz-Canel dialogis kun Telesur: ni volas konstrui pli bonan landon, pli bonan mondon.*



Havano, sept 17 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel estis intervjuita de la televida ?eno Telesur. La dialogo okazis en agrabla etoso, plena je argumentoj, en la intima sobreco de eta halo en la Palaco de la Revolucio, loko kie ofte piediris Fidel kaj Raúl. La intervjuon faris Patricia Villegas, ?urnalistino, ?enerala direktorino de tiu amaskomunikilo.

?i portis amason da demandoj. Ili parolis pri Kubo, Usono kaj Latinameriko, pri la prezidento kaj la homo. ?i estas la unua dialogo de la kuba prezidento kun amaskomunikilo.

La prezidento asertis ke tiuj ?i kvar monatoj, post lia elekto en la nacia asembleo la 19-an de aprilo, estis plenaj je spertoj, kaj la startpunkto de la programo de agadoj estis la parolado de la generalo de armeo Raúl Castro, unua sekretario de la komunista partio, en la konstitucia sesio de la na?a le?ofaro.

Miguel Díaz-Canel rigardis al tikla angulo: ?iu solvo anka? devas esti akompanata de honesta dialogo. “Ne ?io havas tujan solvon, sed la problemo ne kreskas se ni deprenas partojn de ?i, kaj krei?as solva sinergio. Same estas problemoj kiuj povas tuj solvi?i, ?ar ekzistas burokrata decido

kiu baras ?in”

La ?tatestro emfazis ke la problemo kiu batas la ?iutagan vivon de la kuba popolo kaj anka? la ekonomian kaj socian vivon de la lando estas la usona sie?o, kiun li taksis brutala praktiko, celanta komdamni nian popolon morti pro neceso, kaj perfortas la teritoriecon kaj trudas normojn en la rilatoj de la mondo kun Kubo.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/171701-diaz-canel-dialogis-kun-telesur-ni-volas-konstrui-pli-bonan-landon-pli-bonan-mondon

**Radio Habana Cuba**